# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

7a jarkolekto n-ro 10
decembro 1987


Informilo, kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. - Jarabono: 150 BEF - Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 - Respondeca eldonanto *(verantwoordelijke uitgever)*: Monique Caestecker, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge.

---

ESTRARO

Ivo Durwael, prezidanto, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem, tlf. (03) 440 30 92.
Monique Caestecker, sekretario, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge.
Jan Bovendeerd, konsilanto, Meidoorn 42/2, 2510 Mortsel, tlf. (03) 449 50 08.
Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, tlf. (050) 33 00 04.
Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem.
Edward Symoens, Putsesteenweg 131 A, 2180 Kalmthout, tlf. (03) 666 62 66.
Hilde van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst, tlf. (053) 70 50 11.

KOMISIONOJ

**Financoj**: Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.
**Eldona agado**: Chris Declerck, Amerikalei 135/2, 2000 Antwerpen, kaj Paul Peeraerts.
**Manlibro de la aktivulo**: Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3030 Heverlee, tlf. (016) 20 14 53.
**Gazetara servo**: Herman Deceuninck, Villalaan 1 b 4, 1500 Halle, tlf. (02) 360 99 48.
**Rebata servo**: Germain Pirlot, Kemmelbergstraat 5/3, 8400 Oostende, tlf. (059) 70 87 00.
**Instruado**: Petro de Smedt, Hemelstraat 44, 9330 Dendermonde, tlf. (052) 21 26 77.
**Libroservo**: Erik D'Hondt, Wilgstraat 25A, 9440 Erembodegem, tlf. (053) 77 44 97.

# PROTOKOLO

pri la F.E.L.-estrarkunsido de sabate la 5-an de decembro 1987 en Antverpeno

Ĉeestis : Monique Caestecker (MC), Ivo Durwael (ID), Alex Humet (AH),
Paul Peeraerts (PP), Roland Rotsaert (RR), Hilde Vaningelgem (HV)
Senkulpigis : Jan Bovendeerd (JB)

Komenca horo 10.30h

Prezidis : ID, protokolis MC

## 1. Antaŭa protokolo

Aprobite.
AH raportas pri la "Dienstencentrum voor plaatselijk cultureel werk" (punkto 4 de la antaŭa protokolo, kiu rilatas al punkto 4 de la oktobra kunveno). La organizaĵo ofertas helpon al grupoj ekz. kiamaniere kunveni, paroltekniko], ... Kvankam la estraro opinias ke iliaj kursoj estas tre interesaj, ĝi tamen decidas ne uzi la servojn de tiu centro, ĉefe ĉar la lecionoj estas tre multekostaj (1.500 BEF po leciono persone).
Oni resendos slipon por ne perdi la kontakton.

## 2. Mallonga raporto pri la B.E.F.-kunsido de la 28-a de novembro

La estraro de B.E.F. decidis ke la rentumo de ambaŭ fondaĵoj Jaumotte-Loquet kaj Ernst de la periodo 1986-1987 estos dividita inter A.P.E. kaj F.E.L. Ĉar tiu sumo rajtas esti uzita nur por propagandaj celoj, ĝi estos metita en la informa fondaĵo de F.E.L.
B.E.F. enkasigas la subvenciojn de la franca kulturkomunumo por A.P.E. ĉar A.P.E. mem ne povas havi subvenciojn. La Belga Esperanto-movado konsistas do el du partoj : F.E.L. kaj B.E.F./A.P.E. Ĉu ne estus pli simpla apartigi B.E.F. en du asociojn analoge kun ekz. la Ĉeha Esperanto-movado ?
Rilate ĉi tiun proponon de ID, Grégoire Maertens avertis pri tre longa batalo ĉe U.E.A. por rekono de du asocioj, same kiel estis jam siatempe por la Ĉeha movado. Evidentiĝas ke pro praktikaj kialoj la nuna nereala situacio devas resti.
Dum la kunveno Sonorilo prezentis informojn pri la eldono de koloran bild-rakonton pri la vivo de Zamenhof (vidu ankaŭ la protokolon de la maja estrarkunsido). Ĝi kostus 250 BEF.

## 3. Libroservo dum la jubilea festo en Bruselo

Sonorilo petis por fari la libroservon. ID pledis por ke F.E.L. ankaŭ estu tie. Ni koncentrus nin sur libroj kiujn Sonorilo ne posedas.
MC transportos la librojn kaj almenaŭ en la komenco, okupiĝos pri la deĵorado.
Oni petos ankaŭ al aliaj homoj de la centro por kunhelpi.

## 4. Nekrologoj

La estraro decidis ke nekrologoj de naciaj funkciuloj de la Esperanto-movado aperigos en Informilo. En Esperanto-Panorama estos menciita la forpaso de aliaj esperantistoj en nia lando.

## 5. Planoj de F.E.L.

Ni havas longan liston kun planoj, sed ni nur publikigos la plej urĝajn. (vidu sur la alia paĝo).

## 6. Venontaj kunsidoj

9.I; 13.II; 12.III (estrarkunsido antaŭtagmeze, jarkunsido posttagmeze);
9.IV; 14.V; 11.VI.

LISTO DE PLANOJ DE F.E.L. - 1987

| Nomo de la plano | Komenco | Fino | Respondeculo(j) |
|---|---|---|---|
| **PRIORITATAJ PUNKTOJ** | | | |
| Deponi lernolibrojn (Esperanto Programita) en librobutikoj | jan.88 | raporto majo | ID |
| Doni avantaĝojn de F.E.L.-libroservo al abonantoj de Monato | dec.87 | sen | PP |
| Plialloĝigo de Monato rilate al la varbado | jan.88 | sen | PP |
| Sistema kontrolo buĝeto - realigo | jan.88/28.XII.87 | sen | RR + PP |
| Lerneja projekto | dec.87 | sen | AH + André Staes |
| Proponi "Kazinski" al Ministerio por kulturdisvastigado (distribuo en bibliotekoj) | dec.87 | raporto jan.88 | PP + ID |
| Ekspozicio | nun | aprilo 88 | AH + Dirk Deweerdt |
| Adapto perkoresponda kurso | nun | jan.88 | AH + Henny Jacques |
| Membreco VBVB | nun | tuj | PP |
| Sonorilo | nun | ? | ID |
| **NE TIEL URĜAJ** | | | |
| Ellabori novan strukturon (librotenadon) - centro | jan.88 | dec.88 | RR + PP |
| Pristudi interŝanĝeblecoj kun nepagipovaj landoj | dec.87 | sen | ID + PP |
| Plioftigi internajn informojn | K O N S T A N T E | | PP |
| Sistema konsultado reklamkonsilisto 2-4 fojoj en la jaro | jam | sen | ID |
| Pristudi efikecon de niaj investoj | printempo88 | sen | financa komisiono |
| Plivigligo gazetara servo | aprilo88 | sen | ID |
| Kunordigo de Esperanto-kursoj/Kurso por E-instruistoj | jan.88 | sen | AH ? |